# INTER NI

estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 248 Decembro, 2006

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto


Sendu leterojn kaj artikolojn al:
Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5


Abona kosto por Kanado estas $8, por Usono $12, kaj por aliaj landoj estas $20


☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

## ESTINGIĜO? ANKORAŬ NE

Oni eksciis lastatempe pri la pereo de, aŭ almenaŭ pri la granda minaco al, kelkaj gravaj esperantlingvaj informiloj, inter ili la Esperantaj Redakcioj de kaj Pola Radio kaj de RAI en Italio, la unua portalo de Esperanto, „Ĝangalo", kaj ĝia „Internacia Televido", la paŭzigo de ***Fonto***, kaj la evidentaj pereoj de ***Rok-Gazet***' kaj la naturamika movado. Tio okazis ĉefe pro la grandaj kostoj (ĉu por dissendi per radiofonio, ĉu por poŝtokostoj, ktp), eĉ pro la daŭra partopreno kaj subtenado de diversaj lertaj kaj specife trajnitaj, distinge dediĉitaj homoj.

Feliĉe, tio ne multe rilatas al la apero de ĉi tiu gazeteto. ***Inter Ni*** ne estas grava informilo; ĝin ne redaktas intelekta gravulo aŭ eĉ vaste spertita kaj konata verkisto. Ĝi ĉefe estas kolekto da artikoloj verkitaj de la legantaro kaj amikoj inter ni. Eĉ se la poŝtokostoj en Kanado iomete plialtiĝos en januaro, la abonkoston por nia gazeteto ni ne planas altigi. Nia kasisto estas ŝparemulo.

Tamen, legantoj ofte trovas interesajn legaĵojn inter niaj paĝoj. Ĉu ankaŭ vi? Se vi deziras daŭre subteni kaj ricevi tiajn legindaĵojn, mi rekomendas ke vi rapide (re)abonu por resti inter ni.

— Via redaktoro

## FELIĈAJN FESTOTAGOJN

La redakcio de ***Inter Ni*** deziras (malfrue) ankoraŭfoje al ĉiu leganto la plej bonan dum la decembraj kaj jarfinaj festotagoj. Ni ankaŭ esperas, ke vi ĝuas ricevi nian gazeteton, kaj ke vi tuj (re)abonos por la venonta jaro 2007. Dankon pro via intereso kaj partopreno en nia agado, kaj sincerajn bondezirojn por sukcesoplena nova jaro.

— Via redakcio

KLASIKO el 1887

***Esperanto-„Unua Libro"*** de Zamenof nun surrete HTML (Angla)

Finfine, kaj ĝustatempe por Esperanto-Tago: la HTML-a represo de la anglalingva "Dr. Esperanto's International Language: Introduction and Complete Grammar" (50-paĝa ekvivalento, inkluzive de ties originala vortaro).
Senpaga ĉe

http://www.genekeyes.com aŭ http://www.genekeyes.com/Dr_Esperanto.html

## ABITURIENTOJ DE NORDA HANTS KAMPARA MEZLERNEJO

Eble kelkaj el niaj legantoj memoras miajn du studintojn, Ilona Corbin kaj Christopher Henningsen, kiuj abiturientiĝis de Norda Hants Kampara Mezlernejo en Kennetcook, Nov-Skotio, dum junio, 2005. Ilona nun studas ĉe la Reĝa Milita Kolegio en Kingston, Ontario. Ŝi devos dungiĝi dum kvin jaroj en la Kanada Aerarmeo (kiel piloto, ŝi esperas) post sia diplomiĝo de la Kolegio. Intertempe, ŝi akiros universitatan diplomon senpage, kaj dum la ferioj, la Aerarmeo trejnos ŝin kiel piloton. Sufiĉe da gejunuloj faris same ĉar nuntempe multe kostas por viziti universitaton en Kanado. Ilona, kiam ŝi akiros la diplomon universitatan, kiel mi jam diris, devos labori en la Aerarmeo dum kvin jaroj (aŭ pli se ŝi deziros) kaj ŝi ne ŝuldos monon por nek la diplomo nek la trejnado kiel piloto.

Kristoforo nun laboras kiel laboristo sur nafto-borstacio en Lloydminster, en la provinco Alberta en okcidenta Kanado, post kurso ĉe la „Atlantic Petroleum Training College" (marborda trenad-kolegio pri petrolo) en Halifakso. Li intencas tie labori en kelkaj jaroj, ŝpari sian monon kaj poste vojaĝi per la Pasporta Servo. Antaŭ ol li forlasis la hejmon por vojaĝi al Alberta, li kaj la geparencoj invitis min ĉeesti sian 20-an naskiĝtagan feston ĉe ili. Estis nia unua renkontiĝo ekde lia abiturienta ceremonio dum junio, 2005, ĉar li iĝis volontulo en la programo „Katimavik", kiu signifas „kunvenejon" en indiana dialekto. Tio estas registara servado-programo por junaj volontuloj inter la aĝoj de 17 kaj 21 jaroj. Dum naŭ monatoj, la gejunuloj kunloĝas en grupoj de 11 homoj (10 gejunuloj kaj projekto-gvidanto) en tri malsamaj komunumoj en Kanado. Ili devas labori po 35 horoj semajne pri volontulaj komunum-projektoj, aldone al partopreni en strukturitaj lern-agadoj. Katimavik stimulas la personan evoluadon de la partoprentantoj per komunuma engaĝado, trejnado kaj grupvivado. Kristoforo iris unue al Ucluelet, malgranda urbo sur Vankuvera Insulo, Brita Kolumbio. Tie li restis dum tri monatoj kaj helpis fari esploradon pri la vivmediologio de la marbordo kaj arbaro en tiu insula regiono. Li pasigis Kristnaskon tie, laborante en manĝigejo, kie oni manĝigas malriĉulojn kaj senhejmajn homojn. Poste li vojaĝis al Fort Albany en norda Ontario. Tie li ankaŭ restis dum aliaj tri monatoj en krija ("Cree") indiana rezervejo, kie li estis asistanto de instruisto en lernejo. La lasta loko de lia vojaĝo estis La Pocatière, urbeto en Kebekio kie oni parolas la francan, kaj tie li laboris en forcejo kaj helpis konstrui vojetojn. Li diris al mi, ke li multe ĝuis la spertojn en tiuj tri diversaj lokoj de Kanado, kaj li estis kontentega partopreni en Katimavik. Li opinias, ke estis granda aventuro. Li ankaŭ diris al sia patrino, ke la scio de Esperanto multe helpis lin iĝi pli flua parolanto de la franca kiam li loĝis en La Pocatière.

— Kim Keeble, Upper Rawdon NS

## 2006 – La Franca-Germana Jaro

La 14-a de oktobro 2006 estis la 200-a datreveno de duobla batalo de Napoleono kontraŭ prusoj kaj saksoj ĉe Jena kaj Auerstedt en Turingio (Germanio). Ĝi finiĝis per venko de la franca imperiestro kaj kun enkonduko de la fino de la maljuna prusa ŝtato kun ĝiaj multaj malgrandaj landoj.

Okaze de tiu datreveno „batalis” ankoraŭfoje 1600 uniformigitaj aktoroj de milithistoriaj unuiĝoj el 17 diversaj landoj sur la originala batalkampo de 1806 ĉe Jena. Jena havis en tiu tempo nur 4500 enloĝantojn. Certe, en la jaro 1806 batalis ĉirkaŭ 240,000 soldatoj unu kontraŭ la alia (ĉirkaŭ 30,000 soldatoj mortis) sen rigardantoj. 200 jarojn poste vidis tiun spektaklon 30,000 homoj el kelkaj landoj, de Francio ĝis Usono.

La nuna Napoleono nomiĝas Mark Schneider kaj alvojaĝis el Usono. Li jam estas pli ol ok jaroj konata kiel prezentanto de Napoleono Bonaparte en Usono kaj Eŭropo. Aktoroj alvenis el Usono, Kanado, kaj 15 eŭropaj landoj.

Inter la rigardantoj el multaj landoj estis ankaŭ la pra-pra-pra-pranepo de Napoleono Bonaparte, sinjoro Charles Napoleon el Francio.

Sed kial nun tiu spektaklo? La jaro 2006 estis Germana-Franca jaro. Oni volis prezenti kiel, 200 jarojn post tiu batalo, el ĝismortaj malamikoj nun estas amikoj. Komune oni rememoris pri multaj aferoj, kaj per granda koncerto de francaj kaj germanaj artistoj en urbopreĝejo de Jena oni nun komune festis la venkon de historia intelekto.

Multaj ekspozicioj, prelegoj, renkontiĝoj, koncertoj ktp en kelkaj germanaj kaj francaj ejoj dum la tuta jaro okazis antaŭ la 14-a de oktobro 2006, kaj krom tio ankaŭ kune kun germanaj-francaj solenecoj.

— Manfred Scholz, Jena



